

2/917

LATINAMERIKA: ESPERANTISTO



SPECIALA ELDONO POR LA VUNDITOJ KAJ
INTERNIGITOJ ESPERANTISTAJ

La presente edición de **LATINAMERIKA ESPERANTISTO**, se publica sólo en Esperanto por estar dedicada a los heridos e internados esperantistas de Europa, a los que se enviará como fraternal obsequio de los esperantistas de Cuba.

DERBY EL MEJOR CUELLO INGLES
Y EN TODOS LOS MODELOS



DE VENTA EN EL MODELO

OBISPO 93, esq. a Aguacate. - - - Teléfono A.3241


Esperantista Librejo

Gia celo: faciligi al la kubaj esperantistoj akiradon de ĉiuspecaj esperantaj libroj.

J. M. DE VILLA

APARTADO, 1357. — HABANO

LATINAMERIKA ESPERANTISTO



MONATA GAZETO

Oficiala Organo de la Societo Kuba por la propagando de Esperanto
kaj de Latinamerika Esperantista Ligo

Poŝta adreso: Apartado 1324

EMPEDRADO, 79. — TELEFONO, A-6043

JARO 11.

HABANO, FEBRUARO, 1917

N.º 2


Al la Vunditoj kaj Internigitoj Esperantistaj

Tiu ĉi eldono de nia gazeto estas por vi: ĝi kunportas al vi nian samideanan tutkoran saluton. Ĝi estas nova pruvo de tio, ke malgraŭ la diversecoj naciaj kaj lingvaj, simpatia sento kunligas la korojn de ĉiuj homoj. Ni, loĝantaj malproksime de vi, en aliaj vivrondoj tute malsimilaj al viaj, suferas pro viaj suferoj, dividas viajn esperojn kaj sincere deziras, ke baldaŭ vi ĝuu la pacon kaj la feliĉon.

Kiam ni anoncis la publikigadon de tiu ĉi eldono, plej varmajn vortojn de granda nombro da personoj — multaj el ili ne-esperantistoj — renkontis tiu sciigo: vi estu certaj, do, ke tiu ĉi gazeto estas amika sendaĵo de multaj horoj.

Ĉe vi nun regas la Vintro: jen varma tropika blovo iras al vi: akceptu ĝin kore.





La Trezoro de Scheherezada

Bunge, Ingenieros kaj Lugones estas brila trilogio en la argentina intelekta kampo: ili estas la plej altaj reprezentantoj de la argentina pensado kaj estas famkonataj ekster tiu progresema lando, precipe en la hispanparolantaj popoloj.

Hodiaŭ ni ĝojas prezentante al niaj legantoj belan artikolon de unu el ili: Leopoldo Lugones. Ĉiu sekvantaj numeroj aperos tradukaĵojn de la aliaj.

Post kiam la elokventa princino estis savinta sian vivon per siaj rakontoj en tiuj famaj mil kaj unu noktoj helaj kaj dangeplenaj, la kaskadoj oraj kaj juvelŝtonaj, el silkoj kaj el parfumoj, la junulinoj belaj kiel lunoj, la ĝardenoj mirindaj, la urboj eksterordinaraj, la bestoj mirigaj, la koboldoj teraj, akvaj kaj aeraj, la aventuroj kiujn la sorto komplotas por igi reĝon el kamparano, kaj azenon aŭ damcervon sovaĝan el la belkreska ensorĉita kavaliro; ĉio tiu poemo absolute unika, ĉar ĝi elĉerpis la miregindaĵojn el la fantazio je la piedojn de la sultano belbrilega kaj jaluzema, fariĝis la heredaĵo de la princino: la heredaĵo kiun la princino Scheherezada donis al sia popolo, fandante ĉiujn tiujn trezorojn en la miregindaĵon die neparan de smeraldo: la espero.

Kiuj nur vidas en tiuj rakontoj la pentrindan kolorefekton, la naivan entuziasmon imagadi, la senfinan ĝojon naski himerojn beligantajn kaj ĉarmantajn la vivon, kiel suno neniam ĉesas gravuri siajn juvelŝtonojn en la kurantan akvon, tiuj nescias la netaĵon utilon de tiuj legendoj en la popola animo. Por la popoloj imagemaj kaj societemaj kiel tiuj el Arabujo, tiuj rakontoj estas la konsolo de la vivo. Sub ilia renovigita impresoj, kiu fine iĝas mensa stato, la plej humila kamparano vekigis kredante, ke tiu nova tago estas la tago de la sorto, kiam lia plugkingego ingiĝos en la bronzan ringon de iu ajn tombŝtono kondukanta al la trezoro enskribita je lia nomo de la nekonataj potencoj; la malriĉa virino kiu naskas filon en la mizero kaj en doloro, povas imagi sentroeco — eĉ oni povas diri, kun pozitiva kontentiĝo — reĝan sorton por tia malfeliĉa suĉinfano.

Des pli bone se la miregindaĵo ne alvenas. La tagoj sin sekvās ĝis la fino, senĉese iluminataj de la espero, tiel proksima kiel la venonta horo, kiel la proksima minuto; kaj tiamaniere la bedaŭrinda homarano konsumas siajn tagojn kvazaŭ li ilin trairus sur multvalora lapiŝo. Kio gravas ne alveni? La morto estas la sola vera alveno. La vivo estas bela pro la iluzio kiu ĝin ĉarmigas, kiel la pejzaĝo pro la ĉielo de ĝia horizonto. Ĉu okaze aspektas malpli bela tiu ĉielo tial ke ni neniam ĝin atingos?

Ĉe la homoj kiuj vivas kunigitaj, ĉiu malbono devenas de la malegaleco. La legendo egaligas. Ĉu tiu potenculo scias se la sorto rezervas por li la plej mizeran staton en la sigelo de la ringo kiun fiŝkaptisto eltiras el la ventro de fiŝo, aŭ en la vorto kiun posedas kaj kontraŭ li povus uzi la saĝulo de malproksima lando; aŭ ĉu tiu ŝufikisto estos morgaŭ la reĝo; aŭ ĉu, ankoraŭ, en tiu malsata hundo kiu sin apogas kontraŭ lia pordo estas korpigita pro magio filo de sultano?.... Kaj kio sed la beleco, la gracieco, la spirito, igas el sklavino reĝinon ĉe la koro malavara kaj ĉe la honora hejmo de la vera emiro?

Kiam la homoj kredas, ke la vivo estas bela, en iliaj koroj regas la fido. Kiam ili scias, ke ilia parto da feliĉo estas alvenonta minuton post minuto, iliajn animojn animas la espero. Kiam ili sin sentas egalaj, la bonkoreco estas la normo de ilia konduto.

La legendo estas fido, espero kaj bonkoreco. La homoj mal-molkoraj kiuj malestimas la legendon, dirante *ĝi estas mensogo*, ne indas la belecon kaj la graciecon. Ili volus, ke la perloj, la diamantoj, la smeraldoj, la rubenoj, la topazoj de la legendo reale ekzistus. Ili ne komprenas, ke tiamaniere ili jam havus posedanton, kaj estos motivoj por perforto, fiereco, malamo, envio. Dum en la legendo ili apartenas al ĉiuj kaj ĉiujn plibonigas.

La homo vere bonkora, diras la poemoj, estas tiu, kiu riĉigita per la laboro aŭ pro la sorto, sin konsideras nuran depontenanton de Allah kaj, tial, la eĉzekutanton de lia senfina donemeco.


Tiamaniere estas kiel ni plenaj je espero, fido kaj bonkoreco, atingas vidi la vizaĝon de la vero en la smeraldo de Scheherezada.

LEOPOLDO LUGONES

Ĉu vi aŭdis jam pri la evangelio,
 kiu en la form' de juna, verda stelo
 brilas hele al homaro sur ĉielo?
 Ĉu vi aŭdis jam pri unu familio,
 kiu nun formiĝas gaje en homaro
 malgraŭ landaj limoj, malgraŭ vasta maro?

DRO. SCHULHOF

(El "Kanto pri Espero").



En la kontraŭa paĝo ni prezentas kelkajn kubajn fotografarojn: krom du kamparaj vidaĵoj, ĉiuj aliaj estas el ĉefurbo Habano.

Maldekstre dekstren ili estas:

Unua vico: Promenejo; Centra Stacidomo. Dua vico: Tranĉado de sukerkanoj; Sukerfabrikejo. Tria vico: Palmalco; Enirejo de Fortikaĵo Morro; Promenejo Malecon kaj havena enirejo. Kvara vico: Nacia Teatro; Katedralo. Kvina vico: Klubejo; Statuo de edukisto Luz Caballero.

Redakciaj Notoj

Estis nia intenco sendi tiun ĉi eldonon kiel novjaran saluton al niaj fremdaj samidanoj: sed kelkaj cirkonstancoj malhelpis ĝis nun la realigadon de nia deziro.

La gazeto estos senpage sendata al ĉiuj samideanoj vunditaj aŭ internigitaj, laŭ la listoj publikigitaj de *Universala Esperanto-Asocio*.

La regula eldono de nia gazeto konsistas el 32 paĝoj, sed por plifaciligi la baldaŭan aperadon de la nuna, ĝi konsistas nur el 20 paĝoj.

Ni publike esprimas nian dankegon al la meritinda pentristo Sro. Valderrama por lia donaco de pastelo de nia kara Majstro Dro. Zamenhof por ornami la sidejon de nia Societo. Ni bedaŭras, ke la trikolora gravuraĵo kiun ni prezentas en la nuna eldono nur povas esprimi palan ideon de tiu grava arta verko.

Ni ankaŭ estas tre dankaj al kelkaj kubaj samideanoj kiuj malavare monhelpis tiun ĉi eldonon. En la proksima numero ni publikigos iliajn nomojn.

Multaj fremdaj samideanoj demandas al ni pri la abonprezo al LATINAMERIKA ESPERANTISTO kaj petas pruvnumerojn. La jara-bono por eksterlando kostas 3 speemilojn. La preseja kosto en tiu ĉi lando estas tre alta; tial ni ne povas sendi senpagajn pruvnumerojn.



Kuba pejzaĝo

Iom pri nia Lando

Geografio estas scienco malmulte ŝatata; tial ni ne miris ĉiufoje kiam, per la korespondado kun alilandaj samideanoj, ni sciis kiom da eraraj ideoj oni havas pri nia lando. Kelkfoje oni faris al ni tiel strangajn demandojn pri Kubo, ke ni estis devigataj ridegi. Sed ĉu ni ne havas, niavice, la samajn erarajn konceptojn pri malproksimaj malmulte konataj landoj?

Do, anstataŭ ridi, nia devo estas diskonigi informojn pri nia lando; kaj tion ni faras hodiaŭ.

La insulo estis malkovrita de Kristoforo Kolombo la 28an de Oktobro, 1492, sed ĝis la jaro 1511 ĝi ne estis koloniita de la hispanoj kiuj regis en la lando 400 jarojn. Post ĝia liberiĝo la insulo fariĝis respubliko, komencante sian sendependan vivadon la 20an de Majo, 1912.

Tiu ĉi malgranda, sed riĉa kaj bela, parto de la mondo kuŝas en enviema situacio: ĉe la enirejo de la Meksika Golfo, tre proksime de Usono kaj sur la vojo al Panama Kanalo. Ĝi estas insulo longa kaj mallarĝa; ĝia areo estas 44,164 kvadratajn mejlojn.



Vespero ĉe kuba golfeto

Gia vetero estas milda kaj tre agrabla: ĉe dum la plej varma sezono oni ĝuas freŝajn vesperojn. Dum la vintra sezono la vetero estas tiel milda ke usonaj turistoj, forkurante de la malvarmo, alvenas grandnombre por pasigi multajn tagojn tie ĉi.

Krom Aŭstralio, Kubo estas konsiderata la plej sana lando en la mondo. Vidu aliparte interesan tabelon kiu pravigas nian aserton.


La loĝantaro estas 2.500,000 personoj. La ĉefurbo Habano kalkulas 350,860 loĝantojn. Aliaj gravaj urboj estas Santiago, Matanzas kaj Cienfuegos.

La terkulturado en Kubo oni povas diri ke estas entute dediĉata al la sukerkano kaj al la tabako: ambaŭ produktoj alportas al la lando netaksablajn riĉaĵojn. La sukerfabrikado estas la ĉefa industrio de la insulo. La kuba tabako estas famkonata en la tuta mondo.

La kuba ekstera komerco estas tre grava: ĝi enportas ĉiuspecajn artikolojn, kaj eksportas sukeron, tabakon kaj fruktojn.

Kubo havas nacian monsystemon: la monunuo estas la peso samvalora kiel la usona dolaro (du spesmiloj).

La lando prezentas al la turistoj senombrajn allogojn kaj belegajn pejzaĝojn kaj al komercistoj, industriistoj kaj entreprenantoj vastan kampon por profitema laborado.



LATINAMERIKA ESPERANTISTA LIGO

Esperanto ne estas ankoraŭ bone disvastigata en la hispanparolantaj popoloj el Ameriko: en la plimulto el ili ne ekzistas naciaj propagandaj societoj kaj en ili oni renkontas nur kelkajn izolajn grupojn.

Sed alvenos la horo, kiam tiuj ĉi popoloj ludos pli gravan rolon en la tutmonda movado esperantista.

Ili parolas unu saman lingvon: la hispanan; havas komunan originon kaj, krom kelkaj malgrandaj diferencoj, havas la saman civilizacian gradon. Ili povus uzi la samajn lernolibrojn, la samajn propagandilojn; ili povus kunlabori en granda poresperanta movado en Latinameriko.


Kun tiu celo fondiĝis *Latinamerika Esperantista Ligo*: ĝi estos unuiĝo de la naciaj propagandaj societoj por la intersanĝado de propagandaj spertoj, por la komuna uzado de lernolibroj kaj propagandiloj. En tiuj landoj latinamerikaj kie ankoraŭ ne funkcias nacia propaganda societo, la Ligo faros ĉiujn klopodojn por ke oni kreu tiun societon.

La *Latinamerika Esperantista Ligo* havos Komitaton, kiu konsistos el la delegitoj de la naciaj propagandaj societoj, kaj Centran Oficejon. La *Societo Kuba por la propagando de Esperanto* faras la unuajn klopodojn por organizi la Ligon kaj, pro tio, la provizora sidejo estas en Habano kaj **LATINAMERIKA ESPERANTISTO** havas la honoron esti oficiala organo de la Ligo.

—————)o(—————


La jena tabelo montras la promilan mortadon en kelkaj landoj, okupante Kubo la duan vicon, kio estas bona pruvo de la saneco de tiu ĉi lando:

Aŭstralio.	12.60	Anglujo.	17.70
Kubo.	12.69	Germanujo.	17.80
Urugvajo.	13.40	Svisujo.	18.20
Usono.	15.00	Venezuelo.	18.90
Belgujo.	15.20	Francujo.	20.60
Norvegujo.	15.60	Japanujo.	20.60
Svedujo.	16.10	Aŭstrio.	24.40
Danujo.	16.40	Italujo.	29.20
Holando.	17.40	Hispanujo.	29.70



DRO. LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF
AŬTORO DE ESPERANTO

La juna kuba pentristo Sro. Esteban Valderrama, tre bonkonata kiel aŭtoro de meritplenaj pentraĵoj kaj precipe de paŝtelpentraĵoj, al kiuj li speciale sin dediĉas, donacis al ni valoran paŝtelon de nia kara Majstro, kiun ni reproduktas tie ĉi.



PALMOJ

Gracia, majesta, la reĝa palmo (lat. *Oreodoxa regia*) estas la plej ĉarma ormano de la pejzaĝoj en la tropikaj amerikaj landoj, precipe en Kubo, kie ĝi atingas sian plej grandan belecon.






La Lingva Problemo en la Internacia Juro

De la 22a ĝis la 29a de Januaro kunvenis en Habano la 2a. Kongreso de la "Amerika Instituto de Internacia Juro". Tiu grava institucio havas sian sidejon ĉe Washington kaj kiel filioj Naciajn Societojn de Internacia Juro en la 21 amerikaj respublikoj. Grava kaj tre interesa estis la programo de la Kongreso kaj ĝiaj konkludoj, submetotaj al posta trastudo kaj aprobo de la naciaj societoj, estas vera kodo de nova internacia juro.

La januara eldono de la gazeto LATINAMERIKA ESPERANTISTO estis dediĉita al tiu Kongreso — kaj pro tio ĝi aperis nur en hispana lingvo — enhavante ampleksan artikolon titolitan "La lingva problemo en la Internacia Juro". En ĝi oni certigas, ke ekzistas grava lingva problemo en la diplomatia vivo kaj ke estas necese ĝin solvi tuj; oni faras detalan historian ekzamenon de la afero kaj montras ke tri lingvoj, unu post la alia, ludis la rolon de lingvo internacia: la latina, la hispana kaj la franca: tiu ĉi lasta ludante ankoraŭ tiun rolon; post prezentado de argumentoj por montri, ke la nuna maniero solvi la problemon estas netaŭga, oni alvenas al la konkludo, ke estas necese oficiale akcepti neŭtralan lingvon internacian kaj oni prezentas la tri proponitajn solvojn, rilatantajn al la akceptado de mortinta natura lingvo, de vivanta natura lingvo kaj de artefarita lingvo; sekvas diskutado por konkludi, ke nur artefarita lingvo povos taŭge ludi tiun rolon; poste oni pritraktas la profitojn eltirotajn en la diversaj fakoj de la internacia oficiala vivo per la uzado de tiu lingvo, kiu devos esti, kompreneble, Esperanto.

La gazeto estis disdonata al la kongresaj Delegitoj, kun la peto, ke ili donu iliajn opiniojn: multaj el ili promesis tion fari post legado ĉe la verkaĵo kaj estonta numero de LATINAMERIKA ESPERANTISTO publikigos la opiniojn.





Rivero Yumuri, Matanzas, Kubo

REMEMORO PRI MATANZAS

Antaŭ kvin jaroj vizitis nian landon usona esperantistino, F-ino, Delia C. Condron. Ni ne havis la plezuron renkonti ŝin: ŝi eble pensis, ke en Kubo ne ekzistas esperantistoj, tial ŝi ne klopodis renkonti iun samideanon. Sed la vizito al nia lando tiom plaĉis al ŝi, ke poste ni havis la plezuron legi en nia estimata kolego *Amerika Esperantisto* la sekvantan belan artikoleton:

“La urbo Matanzas, en Cuba, sidas sur la bordo de la bela golfeto havanta la saman nomon. La formo de la arkitekturo, la gajaj koloroj de la domoj, la parkoj kun siaj tropikaj floroj kaj foliaĵo, faras ĝin, speciale en Decembro, plej alloga al la okuloj de la homoj, kiuj ĝis tiam konis nur la nudajn arbojn kaj malvarmecon de la norda vintro.

Antaŭ ol mi diris adiaŭ al la urbo, mi supreniris je sunsubiro al la tegmento de preĝejo, kiu staras sur la supro de monteto; kaj la vidaĵo, kiun mi vidis de tie, estis tia kian mi neniam forgesos. Je unu flanko, mi rigardis ebenaĵon de la plej ĉarmega verdaĵo. Ĝi estas la Yumuri valo, nomata la plej fruktoporta valo en la mondo. Je la alia flanko estas la urbo kun la golfeto en la malproksimo.

Ŝajnas al mi ke mi neniam vidis pli gloran sunsubiron; kaj ĝia rebrilo en la akvo de la golfeto, kune kun la bluaj, flavaj, rozruĝaj kaj aliaj helaj koloroj de la domoj, faris tian bildon, kian mi ne havas la vortojn por priskribi. Ĝi estis pli bela ol la plej bela pentraĵo, kiun iu ajn pentristo iam pentris.”

DELIA C. CONDRON



La antikva koncepto pri virino — de nura beleco kaj malforteco — ŝanĝiĝis en novan pli justan koncepton: nun la virino eniris plene en la vivon, eske helpante la viron, kunlaborante kun li per mil diversaj manieroj. Kaj dum la milito ŝi anstataŭas la viron en multaj oficoj kaj ekzercas plej altan mision: kuraci kaj konsoli la vunditojn.

La supra desegnaĵo de usona artisto sukcesis trafe esprimi la du ideojn.



LA PAPERUJO



Oni ne bezonas diri kiu estas Jacinto Benavente nek kion li signifas en la nuntempa hispana literaturo: li estas suŝee bone konata ĉie kaj en Esperanto oni havas multajn el liaj verkoj tradukitajn.

La spaco en gazelo ĉiam estas mallonga: tial ni nur povas publikigi tie ĉi malgrandan teatraĵon de li verkitan kaj tradukitan de nia kompetenta samideano Sro. Vicente Inglada.

PERSONOJ:

KLARA, DEKNAŬJARA.

HENRIKINO, TRIDEKDUJARA.

I

KLARA. — Mi ja diras al vi, ke li sendube ne malfruos veni. Atendu unu momenton.

HENRIKINO. — Unu momenton..... Vi ne plendos; kiam mi venis estis la tria horo.....

KLARA. — Post du jaroj kaj tiom da okazoj!..... Ni ankoraŭ ne kvitiĝis..... Vi ŝuldas al mi multajn vizitojn, pli longajn ol tiu ĉi, kaj multajn konfidenciojn..... Hodiaŭ estis mia vico.

HENRIKINO. — Kompreneble, ĝi estis via vico. Hodiaŭ vi estas pli riĉa, ol mi..... Riĉa per iluzioj, per esperoj, per amo..... Mi estas ruinigita..... Ve al mi!

KLARA. — La morto estas kreditoro, kiu ne pardonas. Sed vi

fariĝis vidvino..... ruinigita, kiel vi diras, tiel juna, ke vi ankoraŭ povas restarigi vian havon.

HENRIKINO. — La entreprenoj min timigas..... Mi vivos min tenanta al la vidvinrento de malaktiva klaso..... (*Paŭzo.*) Ĉu vi scias ke via kavaliro tre malfruas kaj mi ne povos lin atendi?.....

KLARA. — Li ja malfruas. Kie li povas esti?

HENRIKINO. — Kie li povas esti?

KLARA. — Kial vi ripetas mian demandon tiamaniere..... kvazaŭ priokupate, kvazaŭ tio igus vin pripensi?

HENRIKINO. — Ĉar ĝi estis demando..... kaj neniam oni devas demandi "Kie li povas esti?" Se vi sciis kiom da fojoj mi demandis la saman aferon!

KLARA. — Kaj mi. Kaj mi demandas ĝin tiom da fojoj! Kiel ĉiu amanta virino. Minuto-post-minuto mi volus ekscii, kie li estas, kion li faras kaj kion li pensas.

HENRIKINO. — Ne volu ekscii..... En amo, kiel en religio, scio estas proksima de herezeco.

KLARA. — Bah! Ĉar mi ne povus ekscii ion malbonan pri Karolo!.....

HENRIKINO. — Ĉu vi konas lin funde?

KLARA. — Lia koro ne havas sekretojn por mi.

HENRIKINO. — Lia koro! Naiva Klara! Mi ankaŭ kredis, ke la koro de Joĉjo estas tute mia, ke ĝi ne havas sekretojn por mi!..... Kia frenezo! Ne estas koro ne havanta ian sekreton..... Ĉu la koro? Eĉ ne tiel supre. Mi ne volas vin timigi; sed, ĉu vi volas fari provon? Vi penu subite kapti la paperujon de via fianĉo; vidu, kia bagatelo, la poŝa paperujo!..... Nu, kredis al mi; se vi volas esti feliĉa, neniam intencu trasplore la paperujon de la amata viro.....

KLARA. — Mi kredis, ke vi estis feliĉa en edzeco.

HENRIKINO. — Mi estis, mi povis esti, se mi ne estus volinta ekscii..... Ĉar Joĉjo min amis; min tre amis..... ĉiom, kiom li povis ami.....; sed la paperujo..... kredis ĝin, ĉiu viro havas ĉiam kaŝitan pretsekreton.

KLARA. — Bah! Sekreton..... kaj li ja estus tiel nesingarda, ke en la paperujo!.....

HENRIKINO. — Ve! La paperujo de Joĉjo ne estis poŝa, sed granda kajero, kaj mi trovis ĝin post lia morto..... Kaj tamen li min amis, min tre amis.....

KLARA. — Henrikinio, mia Henrinjo!

HENRIKINO. — Kio okazas al vi, mia kara?

KLARA. — Ĉio, ĉio finiĝis por mi! Vi prave diris..... La paperujo..... mi eĉ ne povis ĝin malfermi; per tuta forto li fortiris ĝin el miaj manoj; li preferis foriri ne atentante miajn larmojn, nek

miajn insultojn..... ĉar mi insultis lin, jes, mi insultis..... kaj mi lin malamas.....

HENRIKINO. — Vi ne estas prava. Mi sentis tion saman, kion vi nun sentas..... Vi almenaŭ ne vidis la materian pruvon de la trompo..... Estas sekretoj, kiujn oni gardas pli pro delikateco, ol pro trompo..... Sed estas ĉiam sekretoj..... Faru skrupulan esploron en via konscienco, vi konstatos, ke vi kliniĝas al pardono. Ĉu vi ne havas ankaŭ iun paperujeton?

KLARA. — Mi ne..... Mi ne havas sekretojn por li.....

HENRIKINO. — En paperujo..... palpeblaj..... Kaj en la koro? Atentu; ŝajnas vulgaraĵo tio, kion mi tuj diros al vi..... La viroj, estas viroj; la virinoj, virinoj..... Kia malspritaĵo, ĉu ne vere? Nu, el tio devenas, ke ili ne komprenas unu la alian. La animoj havas sekson, kaj ne estas dubo, la animo de la viro kaj la animo de la virino estas tiel malsamaj kiel tero kaj maro, kiel maro kaj ĉielo; ili povas sin kisi reciproke, kuniĝi, sed ili ne povas unuiĝi. Viroj kaj virinoj devas respekti kaj pardoni unu al la alia la sekreton de la paperujo.....

KLARA. — Ne, ne. Mi ne pardonas..... Mi amis lin el tuta koro. Se estas vero tio, kion vi diras, la vivo estas tre malgaja; mi ne vivas en la mondo, mi iros en monaĥejon.....

HENRIKINO. — Vi pripensas la aferon. Kaj se vi, ne volanta pardoni vian fianĉon, fordonas vin al Dio..... imagu nur la paperujeton da sekretoj, kiujn Dio devos pardoni al vi por esti via edzo!


La Centra Oficejo de la Societo Kuba por la propagando de Esperanto, kiu samtempe estas la Delegitejo de Universala Esperanto-Asocio, plezure respondos ĉiujn demandojn pri Kubo kaj laŭeble plenumos ĉiujn servojn petotajn de fremdaj samideanoj.

La samideanoj vizitontaj Kubon bonvolu antaŭsciigi la alvenon, sendante avizon al nia poŝta adreso: Apartado 1,324, Habano.

La sidejo de nia Societo estas ĉe Empedrado 79, supra etaĝo, kontraŭ la Policejo.

MALACATES MECANICOS

PARA TRASBORDADORES
DE CAÑA



Con este aparato no se necesitan bueyes.
Economía y rapidez son sus distintivos.
Hay siempre en existencia, así como piezas de
repuesto.

VICTOR G. MENDOZA

CUBA NUM. 3. — APARTADO 1670

HABANA

BELAJ SIGELMARKOJ

Nia samideano Sro. Joan Amades eldonis propagandajn sigelmorkojn tre belajn, enhavante la propagandan frazon "Lernu la lingvon internacian Esperanto" en ĉiuj eŭropaj lingvoj kaj en tiuj plej gravaj el Azio kaj Afriko.


Tiuj sigelmorkoj estas tre utilaj por la propagando kaj samtempe tre valoraj por kolektistoj. La prezo estas 20 cendoj per 100 markoj en sama lingvo: la monon oni devas sendi per 4 respondkuponoj. Scio de 50 markoj en 50 diversaj lingvoj por 2 respondkuponoj.

Adreso: Sro. Joan Amades, Peu de la Creu 10, tenda, Barcelona.

LA POEZIO

Kiu estas tiu ignoranto, kiu kredas, ke la poezio ne estas bezona al popoloj? Ekzistas personoj kun tiel malgranda mensa vido, kiuj kredas, ke ĉiu frukto finiĝas ĉe la fruktoŝelo. La poezio, kiu kunigas aŭ malkunigas, kiu fortigas aŭ ĉagrenigas, kiu subtenas aŭ faligas la animojn, kiu al homo donas aŭ deprenas la fidon, estas pli necesa al la popoloj ol la industrio mem, ĉar tiu ĉi donas al ili la vivrimedojn, dum tiu donas al ili la deziron kaj la forton de la vivo.

JOSE MARTI



EL LETERO AL AMIKINO

"Mi konas la plej bonajn fremdajn tualetaĵojn, sed mi devas konfesi al vi, ke mi preferas la tie ĉi fabrikitajn de Crusellas. Mi varme rekomendas al vi la Bovin-galan Sapon kaj la Koloniakvon Mercedes: la aliaj parfumaĵoj ne estas malpli rekomendindaj..."

MARINJO

EXPOSICIÓN
NACIONAL
VALDIA
SANTO DOMINGO 1899

Bombon Purgante

del DR. MARTI



Padre Cariñoso

Purga a su hija sin mortificarla

Le da BOMBON PURGANTE del Dr. Martí,
que ella toma con deleite porque no sabe a medicina.

Es un bombón igual al de la dulcería; en su rica
crema lleva oculta la medicina que sirve de purgante.

EN TODAS LAS FARMACIAS.

DEPOSITO
"EL CRISOL", NEPTUNO NO. 91.